# BENELUKSA ESPERANTISTO

Ĉi tiu kongresa gazeto 'Beneluksa Esperantisto' samtempe estas numero 1953-3 de la revuo Belga Esperantisto" (vidu piednoton je p. 25 de Belga Esperantisto numero 4, oktobro 1953

SPECIALA KONGRESA NUMERO

DE BELGA, FLANDRA KAJ NEDERLANDA ESPERANTISTO(J)


## ANTVERPENO, LA SENEGALA

*Antverpeno, Skeldreĝino,*
*Invitemas kun gastam'.*

*(„La Kongreskanto")*

Pli ol tri cent kongresanoj pasigis tri tagojn en Antverpeno, Skeldreĝino, kiel diras S-ro Vermuyten en la Beneluksa Kongreskanto.

Kaj pri la beleco de la Skeldo ĉe kiu kuŝas Antverpeno, la kongresanoj ĉiuj efektive povis konvinkiĝi dum agrabla, ripoziga ekskurso en la lunda tago.

Sed antaŭe . . . dum du longaj tagoj, ili devis travivi la restadon en Antverpeno la Senegala . . . Kaj, tion dirante, ni ne pensas pri „sen-egala", sinonimo de „senkompara", sed pri tropika temperaturo, kiu regis de l' mateno ĝis vespero kaj eĉ dum la nokto kaj kiu daŭre pensigis nin pri klimato en iu Senegala aŭ alia Afrika regiono.

La L.K.K., kiu efektive mendis belan veteron, akiris de la meteorologiistoj iom tro da tiu bonajo . . . Sed, kiam ni, en la tuj postaj tagoj, devis refajrigi niajn fornojn kaj hejtilojn, ni tamen, — pli bone ol dum la kongreso —, sentis dankemon al tiuj bonaj veterfarintoj, kiuj zorgis ke ni ne pluvis, ke ne ŝtormis, ke ni ne frostotremis . . . Kaj ke ni efektive ĝuis glaciajon kaj freŝan glason da biero!

### En la Kongresejo

Jam de l' mateno frue, pluraj kunlaborantoj de la L.K.K. eklaboris vigle en la Kongresejo, tiel ke ĉio estu preta kiam, je la 13.30a, oficiale malfermiĝos la Akceptejo.

Je tagmezo cetere ĉio estis preta kaj kiuj alvenis, povis, en la duonombro de moderna saloneg-lumigado, admiri la luksan dekorajon de la tri sinsekvantaj ĉambregoj sur la unua etaĝo de la konstruaĵo „Ambassades", en kiu disvolviĝis la plej granda parto de la Kongreso.

La salonegoj mem estas ĉiuj tri, laŭ aparta stilo, abunde dekoritaj kaj donas vere riĉan kaj artan impreson.

Suprenalveninte, oni tuj, en la vestiblo, vidas grandan tabulon kun plano de la urba centro, kun esperantaj klarigoj kaj kun sciigoj pri la last-aliĝintaj kongresanoj, pri la divido de la salonoj kaj la ekzakta horaro de ĉiu okazajo; kaj, tute apude, oficialan poŝtoficejon, en kiu dejoras du esperanton scipovantaj oficistoj, S-roj Cautaert kaj Pintjens.

En tiu ĉi oficejo, oni povas ne nur aĉeti ĉiujn belgajn poŝtmarkojn, sed ankaŭ stampigi sian korespondaĵon per la speciala stampilo:

ANTWERPEN

**Beneluksa Esperanto-Kongreso 1953**

En angulo de la meza salono, estas arangita la akceptoficejo, kie dejoras pluraj samideanoj; tiuj ĉi rapide disdonas la kovertojn, kiuj enhavas la kongreslibron, por tiuj kiuj ne jam poŝte ĝin ricevis, la kuponaron por la menditaj loĝejo, manĝoj kaj programeroj, kaj abundan dokumentaron disponigitan de la Oficiala Turisma Oficejo de la Urbo, kaj inter kiu tre taŭga plano de Antverpeno.

Flanke de la akceptoficejo estas la gazeta sekretariejo, en kiu prepariĝas la dokumentoj por la jurnaloj; kaj fine bela budo de la Institutoj belga kaj flandra, en kiu oni povas havigi al si seriojn da antverpenaj poŝtkartoj kun esperanto-klarigoj kaj ĉiuspecajn esperantaĵojn, inter kiuj multaj leg- kaj lerno-libroj.

Ĉiuj alvenintoj estas bonvenigataj kaj helpataj de la prezidanto kaj de la membroj de la L.K.K. mem kaj baldaŭ regas en la salono tre kora atmosfero kaj ĉiuj havas la okazon interkonatiĝi aŭ rekoni amikojn kelkfoje jam de jaroj ne plu renkontitajn.



*La Oficiala Kongresa Foto*

### Unuaj kunsidoj

Je la tria, la juĝantoj de la Literatura Konkurso, S-roj Kalma kaj Vermuyten, havas kunsidon kun la prezidanto de la L.K.K., por la aprobo de la protokolo pri la Literatura Konkurso, kies premioj estos disdonataj dum oficiala Kongreskunsido.

Je la kvara, okazas en la salono C la jarkunsido de „Belga Esperanto-Instituto", Koopera Societo.

Por montri ke absoluta akurateco estos la karakterizo de tiu ĉi kongreso, la prezidanto de la L.K.K., S-ro Maur. Jaumotte, kiu estas la administranto-prezidanto de B.E.I., ekzakte je la kvara, malfermas la kunsidon . . en ĉeesto de neniu akciulo.

La ekaŭdo de la baldaŭ de ĉiuj konata voĉo enirigas, en malpli ol unu minuto, pli ol dudek akciulojn, tuj sekvatajn de aliaj interesuloj.

La prezidanto, ĉirkaŭata de S-roj De Ketelaere, Sielens kaj Van den Bossche, faras unuan deklaron pri la proponita ŝanĝo de la valoro de la akcioj, kiu estonte estos Fr. 250 anstataŭ Fr. 100. Tiu propono estas unuanime akceptita. Ĝi estos publikigata en la „Belga Ŝtatgazeto" kaj, dum la monatoj de junio kaj julio, do povos efektiviĝi la interŝanĝo de la akcioj.

Poste estas akceptataj sen diskuto kaj per apartaj voĉdonoj: la Bilanco por la jaro 1952-53, la Kalkulo pri Perdoj kaj Profitoj kaj la kvitigo al la administrantoj kaj komisaroj.

S-ro Morris De Ketelaere, kies mandato de administranto finiĝas, estas reelektata por nova periodo de ses jaroj.

### Labora Kunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista

Dum, sub la gvidado de Ges-roj Debacker kaj de F-ino Henny De Ketelaere, okazas promenadoj por la nederlandaj samideanoj kaj por tiuj, kiuj ne konas la urbon Antverpenon, Reĝa Belga Ligo havas, je la 17a horo, sian ĉiujaran kongresan laborkunsidon.

Ĉar D-ro Paul Kempeneers estis petata de S-ro Malmgren reprezenti UEA ĉe la Beneluksa Kongreso, tiu kunsido malfermiĝas sub la prezidanteco de S-ro Maur. Jaumotte, vicprezidanto, kiu bonvenigas la membraron.

La temo elektita, pasintan jaron, por tiu ĉi kongreso estas „Ruĝa Kruco kaj Esperanto" kaj D-ro Kempeneers detale klarigas la internacian vidpunkton, memorigante pri Henri Dunant, la ekesto de la Ruĝ-Kruca agado, la internaciaj konvencioj rilate al la vunditoj kaj militkaptitoj, dum S-ro Jaumotte priparolas la aferon laŭ nacia vidpunkto kaj antaŭmetas ideojn rilate al tio, kio estas farebla por Esperanto ĉe la belga Ruĝa Kruco.

Por la Oratora Konkurso sin enskribigis nur unu kandidato S-ro Ch. Van Gompel de la antverpena grupo „La Verda Stelo", kiu tre vigle kaj interese pritraktas la temon „La rolo de Esperanto por la internacia proksimiĝo de la junularo".

S-ro Jaumotte lin multe laŭdas kaj diras sian esperon, ke, dum estontaj kongresoj, ankoraŭ ofte junuloj povos alporti, per sia parolo, kuraĝigon al la maljuniĝantoj.

---

### Al la legantoj!

*Tiu ĉi speciala numero, eldonita kun la helpo de la L.K.K. de la Beneluksa Esperanto-Kongreso organizita de Flandra Ligo E-ista, L.E.E.N. kaj Reĝa Belga Ligo E-ista estas sendata al ĉiuj membroj, abonantoj kaj legantoj de la organoj „Belga, Flandra kaj Nederlanda Esperantisto(j) kaj al la aliaj kongresanoj!*

*Ĝi celas havigi al ili rapidan raporton pri la granda kaj grava Pentekosta okazajo en Antverpeno kaj konfirmi ĝian plenan sukceson kaj la esperon ke ĉiuj partoprenintoj kunportis el la kongresurbo la konvinkon pri la estontaj feliĉaj sekvoj.*

*La escepta numero ne prezentos la kutimajn rubrikojn kaj aperos iom malfrue (pro presejaj kialoj): la ĉefredaktoro ja certas pri via komprenemo kaj pardono!*

*Ĝi fine anstataŭas la junian numeron de „Belga E-isto" (45-a jaro), de „Flandra E-isto" (Twintigste jaar gang, nr 6-227) kaj de „Nederlanda E-isto" (XVII-e Jaargang, no. 6).*

---

### KULTURA HORO

#### Parolado de D-ro Ivo Lapenna

Akurate je la 18a horo, la prezidanto de la L.K.K. prezentas D-ron Prof. Ivo Lapenna, kiu alvenis en Antverpeno jam vendredon posttagmeze kaj kiu, tiun vesperon, parolis pri la situacio de Esperanto en la nuntempa mondo, antaŭ cent kvindek membroj de E.K.I., la Esperanto-Komitato Intergrupa, antaŭ kiuj ankaŭ paroladis S-ino Ljuba Lapenna, pri „Siberio".

Por la kongreso, D-ro Lapenna elektis kiel temon „Esperanto kaj UNESKO".

Dum tri horkvaronoj, la lerta paroladisto memorigas la longan historion de Esperanto antaŭ la Ligo de Nacioj, post la unua mondmilito; la petskribon organizitan de U.E.A. kaj kiu estis transdonata al la UNO kaj la lastajn epizodojn dum la kunsido de UNESKO en Parizo en novembro 1952a.

Kiel ĉiu scias, tiu kunsido fine alprenis rezolucion, kies teksto estas publikigita en ĉiuj esperanto-gazetoj. Sed D-ro Lapenna re-kunvivigas al ĉiuj la dramajn momentojn el tiu lukto ĉiuhora, kiun li, dum tri semajnoj, devis daŭrigi en Parizo kontraŭ la indiferenteco de la delegacioj de la diversaj nacioj.

Per trafaj ekzemploj, li montras kion kapablas realigi kelkaj homoj, kiam ili estas antaŭenpuŝataj de Esperanta idealo.

Longa aplaŭdo rekompencas la oratoron post liaj tre trafaj konkludaj vortoj.



*La impona Kongresanaro antaŭ la Urbdomo.*
(kliŝo: „De Nieuwe Gazet").

# OFICIALA MALFERMA KUNSIDO

## D-ro Theo Van Gindertaelen elektata kiel Kongresprezidanto

Je la 19a precize kaj ĉe la sonoj de „La Espero", la gvidantoj de la movado en la Beneluksaj landoj supreniras la podion.

Sur fono de artaj esperantaj flagoj montriĝas, malantaŭ la longa verda tablo, bela busto de D-ro Zamenhof.

S-ro Jaumotte, prezidanto de la L.K.K., estas ĉirkaŭata dekstre de D-ro Theo Van Gindertaelen, D-ro P. Kempeneers, vicprezidanto de UEA, S-ro G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista kaj, maldekstre, de lia Ĝeneral-Konsula Moŝto Duco Middelburg; S-ro G. Weeke, vicprezidanto de L.E.E.N., S-ro H. Sielens, ĝenerala sekretario de Reĝa Belga Ligo Esperantista; D-ro I. Lapenna; S-ro J. Van Gulck, prezidanto de Skolta Esperanto-Ligo; de la membroj de la L.K.K.: S-roj P. M. Mabesoone, vicprezidanto; A. Pittoors, kasisto; F. Volders, festkomisaro; J. Verstraeten, propagandestro; Morris De Ketelaere, alelektita komitatano, kaj krome, de S-roj A. Kalma kaj H. Vermuyten, membroj de la juĝantaro de la Literatura Konkurso kaj de delegitoj de reprezentataj landoj.

S-ro Maur. Jaumotte, unua parolas: li konstatas ke, se eble la opinioj povas diferenci rilate al la realigo de la ekonomia Benelux, la „Beneluksa Ideo" mem tamen estas belega, ĉar ĝi estas ideo kuniga, same kiel Esperanto, kiu volas la kunigon ne nur de kelkaj apude vivantaj popoloj, sed de ĉiuj popoloj en la mondo.

Li diras sian grandan ĝojon ĉar li, unuavice, havas la okazon ĉiujn bonvenigi en la urbo Antverpeno.

Li invitas la ĉeestantojn aplaŭde elekti, — laŭ propono de la prezidantoj de la tri organizantaj Ligoj —, D-ron Theo Van Gindertaelen, kiel Kongresprezidanton.

Kiam longaj aplaŭdoj konfirmis tiun elekton, S-ro Jaumotte starigas, antaŭ la sidlokon de D-ro Van Gindertaelen, tablan flageton, dum li transdonas al li prezidantan sonorilon, kiun donacis Bruĝa Grupo al Antverpena grupo, kiel simbolon de amikeco inter du fratinurboj.

D-ro Van Gindertaelen tiam leviĝas kaj eldiras sian prezidantan paroladon.

Li akcentas la gravecon de la tago, indikante la elementojn, kiuj pruvas tion; la elekto de Antverpeno, kiu ludis tiom gravan rolon, ĉefe por la naciaj Esperanto-okazajoj; la ĉeesto de tiom da eminentuloj, inter kiuj, la ĝenerala konsulo de Nederlando kaj pli ol 350 kongresanoj; la eldono de Kongreslibro, de memoriga poŝtkarto ktp. Li memorigas pri unua kontakto kun Dro Kempeneers, la Prezidanto de RBLE, kaj poste kun la diversaj gvidantoj de la tri organizantaj asocioj, tiel ke ebliĝis ĉi tiu Beneluksa kongreso. Ĝi pruvu al eventualaj skeptikuloj ke estas evidenta la kunlaboro, kiu sendube fariĝos, post la unua eksperimento, pli intima, pli fruktodona por la realigo de la Idealo de Zamenhof! Tion niaj movadoj ŝuldos al Antverpeno, kiu rajte fieras pri la daŭrigo de sia historia rolo, ankaŭ sur nia kampo!

Tiam D-ro Van Gindertaelen, laŭvice, transdonas la parolvicon al S-roj A. Weeke, vicprezidanto de L.E.E.N.; G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista, kaj H. Sielens, ĝenerala sekretario de R.B.L.E., kiuj, en diversaj manieroj, tamen ĉiuj tri, — malgraŭ la nunaj malfacilajoj, kiujn travivas Benelukso —, diras sian fidon en la plena sukceso de la Beneluksa Kongreso, organizita en Antverpeno.

Ili diras sian ĝojon pri la farita klopodo kaj sian nepran certecon pri la bonaj sekvoj, kiujn alportos al ni tiu ĉi komuna agado.

Kaj ĉiuj ĉeestantoj substrekas tiujn kuraĝigajn vortojn per aplaŭdo.

Kaj estas nun la vico de S-ro J. Van Gulck, prezidanto de la Societo de Esperantistaj Skoltoj, en uniformo de Skoltestro, kiu per kelkaj trafaj vortoj, ne nur alportas saluton de la esperantistaj skoltoj de la tuta mondo, sed ankaŭ petas ke la naciaj Ligoj en la Beneluksaj landoj speciale atentu la skoltojn kaj helpu la S.E.L.-agentojn interesigi la skoltojn por Esperanto.

D-ro Kempeneers poste salutas la kongreson kaj la tri partoprenantajn Ligojn nome de U.E.A. Li historie klarigas la situacion de la universala movado ekde la kontrakto de Helsinki, kun la multaj evoluadoj, kiuj fine tamen kondukis al unueca laboro kun la helpo de ĉiuj naciaj societoj.

Li diras sian ĝojon personan kaj ankaŭ tiun de la estraro de U.E.A. pro la klopodo, farata per tiu ĉi komuna kongreso kaj esperas ke ĝi ne havos nur momentajn, sed daŭrajn rezultojn, pri kio li cetere ne dubas.

Oni aŭdas ankoraŭ S-ron T. Jung, redaktoron de „Heroldo de Esperanto", kun vere „nuksoŝela" saluto, kaj S-ron Giloteaux, delegiton de la franca nacia societo kaj reprezentanton de „Nord-Eclair".

### La Nederlanda Konsulo ĝenerala parolas Esperanton

Tiam ekstaris lia ĝeneral-konsula Moŝto Duco Middelburg, kiu per esperantlingva letero akceptis iĝi membro de la Honora Komitato; kiu skribis bonvenigan parolon en la Kongreslibro kaj kiu nun agrable surprizas la ĉeestantojn per flue elparolata lingvo.

Li memorigas pri sia ĉeesto, - en 1928a en tiu ĉi sama urbo, - de la XXa Universala Kongreso, en kiu lin multe impresis la perfekta prezentado de „Hamlet", fare de la profesiaj aktoroj de la Reĝa Nederlandlingva Teatro (K.N.S.).

Li ankaŭ substrekas la malfacilajojn, kiujn renkontas Benelux, sed despli ĝojas ĉar la esperantistoj ne timas tiun momentan situacion kaj kuraĝe faras pioniran laboron, ankaŭ sur tiu kampo.

Li daŭrigas momente nederlandlingve, por altiri ĉies atenton sur la allogajoj de Antverpeno, havena, komerca kaj amuza urbo, — la urbo de la „plezànte mannen in een plezànte stad" kaj, dum tiuj ĉi tagoj, ankaŭ la urbo de la impona „Grote Sinksenfoor", kun ĝiaj amuzajoj . . . kaj ĝiaj „smoutebollen".

Li konkludas en Esperanto, dezirante al la Kongreso plej brilan sukceson.

Tondra aplaŭdo komprenehle substrekas tiun ĉi paroladon.

### La Literatura Konkurso

Nome de la L.K.K. kaj nome ankaŭ de sia kunjuĝinto S-ro Kalma, S-ro H. Vermuyten legas la protokolon pri la Literatura konkurso, kiun la L.K.K. organizis, kun la apogo de la tri Ligoj.

Pro la ne granda nombro de partoprenoj, la juĝantaro proponas disdoni nur la duonon de la antaŭ vidita sumo de Fr. 1.500 kaj konservi la alian duonon por baldaŭ organizota nova konkurso.

Jen sekvas la rezultato de tiu ĉi konkurso. Akiris:

**Prozo:**

1. „La kastelo kie ĉio estas ebla" de „Vojaĝanto" (F-ino W. M. Smit, Amersfoort) la premion de fr. 150.—

2 a-b. „La vizito de mia Praavino" de „Songulino" (s-ino M. L. A. Nederkoorn, Doetinchem) kaj „La Koncerto" de „Paŝon post paŝo" (s-ino J. Slösser-Bresler, Gorinchem), ambaŭ premion de fr. 100.—

3. „Pereo" de „Erik Fredo" (F. Weeke, Diepenveen);

4 a. „Jes, serĝento, mi alvenas" de „Ŝa Pu Bej" (Ch. Poupeye, Brugge).

b. „Ŝi" de „Kruceto" (L. Génin, Jette);

5. „La Poeto de Florina" de „Sanarido" (P. v. d. Poel, Mechelen).

**Poezio:**

1. „La Bard' kun Lir' sen Muzo" de „Sanarido (P. v. d. Poel, Mechelen), la premion de fr. 150.—.

2. a) „Melolonto" de „Kontraŭ Doloro helpas bona Humoro" (s-ino A. Meutens, Leuven).

b) „Dediĉo" de Kruceto".

Interkonsente kun s-ro Jaumotte, prez. de L.K.K. la juĝantaj decidis donaci al ĉiuj kontribuintoj, kiuj ne gajnis monpremion, la libron „Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto" de P. Stojan.

La juĝintoj:
H. Vermuyten.
A. J. Kalma.

Post kelkaj pliaj komunikoj, D-ro Van Gindertaelen fermas tiun unuan oficialan kunsidon, invitante ĉiujn ĉeesti la tuj okazontan balon.

### La Kongresa Balo

Dum tiuj, kiuj deziras, trovas en la apuda salono sandviĉojn, por forigi la malsaton, ĉio estas enordigata por la Kongresa Balo kiu, same kiel la aliaj programeroj, estas okazonta en la kunigitaj salonoj.

Baldaŭ vigla orkestro zorgas ke ĉiuj dancemuloj forlasu siajn seĝojn por, meze de la salono, . . . ekŝviti . . . kaj tio daŭros ĝis tio, kion oni kutime nomas „jam matenaj horoj".

Ĉiuj, — gejunuloj kaj pli saĝan aĝon atingintaj kongresanoj —, bone amuziĝas kaj ŝajne ne laciĝas, malgraŭ la granda varmo, kiu regas en la salonoj, kiel cetere sur la stratoj, kie multaj iras, dummomente, refreŝiĝi promenante en tiu, ankaŭ nokte, vivplena kvartalo.

S-ro Volders zorgas por amuzaj interludoj kaj tiel ĉio okazas je la plej granda kontenteco de la partoprenantoj.

### ZAMENHOF-strato

**S-ro Jaumotte tiam urĝe petas la parolvicon por komuniko de jus ricevita letero. Temas pri letero de la Antverpena Urbestraro, datumita de la 21a de majo kaj kiu tekstas:**

*La URBESTRARO al*
*Sinjoro, BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO*

*Sekve al via letero de la 13a de marto pasinta, ni havas la honoron komuniki al vi, ke nia Estraro intencas proponi al la Aŭtoritatoj nomi la straton, projektitan inter la Jan de Voslei kaj la Boomsesteenweg, laŭ la iniciatoro de Esperanto:*

*„Z A M E N H O F - straat"*

*Akceptu, Sinjoro, la esprimon de nia estimo.*

*Nome de la Urbestraro:*

*Laŭ Ordono*
*La rajtigita vic-Urba Sekretario*
*(s.) E. Crahay*

*Por la Urbestro*
*La delegaciita Skabeno*
*(s.) F. Tijsmans*

**S-ro Jaumotte legas kaj tuj tradukas tiun tekston, klarigante ke la propono al la ŝtataj Aŭtoritatoj estas nur formalajo kaj ke la decido de la Urbestraro do povas esti konsiderata kiel ne nur projekto, sed kiel efektiva decido, kiu do baldaŭ realiĝos.**

**Entuziasma aplaŭdo ekaŭdiĝas ĉe tiu ĉi ĝojiga komuniko.**

# L A D I M A N Ĉ A T A G O

### Diservoj

En la kapelo de la S-ta Jan Berchmans' Kolegio, la katolikaj kongresanoj trovas, dimanĉon matene, Pastron De Mayer, fidelulon de la kongresoj de Belga kaj de Flandra Ligoj kaj kiu, unufoje pli, estas dironta la Sanktan Meson kaj predikonta por siaj samreligiaj kongresanoj.

Ĉiuj, kiuj lin konas, ankaŭ konas lian belesperantan kaj altnivelan predikmanieron, ĉiam ĝuindan.

En la preĝejo de la Lange Winkelstraat okazas samtempe religia servo, kun la kunlaboro de Pastro Graaf, de la Antverpena Protestanta Preĝejo; de S-ro W. H. Koopmans, instruisto pri religio en Hilversum, kaj de lia edzino J. Koopmans-Schotanus, solkantistino kun en dueto, F-ino Idoen Rotteveel, kiuj aŭdigas himnojn el la „Psalmoj kaj Himnoj" de la nederlanda reformita Eklezio.

### Jarkunsido de Fl.L.E.

(Raporto de G. M.)

Nur kelkaj minutoj post la indikita horo nia Prezidanto, Sro Debrouwere malfermis la kongresan kunsidon en la meza salono de „Ambassades", kie ni notis ĉirkaŭ 40 geĉeestantojn.

La unua punkto sur la tagordo vekis viglan debaton inter la estraranoj kaj kelkaj liganoj; temis pri la sekvonta kongreso. Sro Debrouwere mallonge klarigis ke la estraro jam principe akceptis la proponon de R.B.L.E. okazigi Beneluksan kongreson en Lieĝo. Tamen niaj nederlandaj samideanoj decidis, pro la okazonta Universala Kongreso en Haarlem, ne organizi kongreson sed kunvoki la estraron kaj la delegitaron al jarkunveno, komence de Aprilo. Ili tamen pretas instigi la membraron viziti la Beneluksan kongreson se ĝi okazus en Lieĝo.

Aliflanke la estraro de Fl.L.E. ne povis decidi pri tio, ĉar la statuto ne permesas al ni arangi kongreson en loko kie ne estas anoj de la ligo.

Post tiuj klarigaj vortoj fare de la Prezidanto, Sro Roose, vic-prezidanto, atentigas pri la fakto ke la antaŭvidoj rilate la ĉeeston tute ne estas brilaj, kaj ke ni devas eviti kongreson kun malgranda partoprenantaro pro la malbona propagando. Do, pli bone ne kongresi en '54 kaj poste, eble kun RBLE viziti Nederlandon.

Sro Mooij proponas flandran urbon; Sro Jacobs proponas solenan kunvenon dum la U.K. Sro Van Gindertaelen refutas tiujn proponojn.

Sro Iserentant pledas por Lieĝo; Sro Roose akordiĝus se ni estas certaj ke la LEEN-anoj ĉeestos.

Je tiu momento envenas Dro Kempeneers kaj Dro Lapenna kiuj salutas la kunvenon nome de UEA.

Poste okazas la voĉdonado pri la kongresloko, kaj preskaŭ unuanime oni akceptas Lieĝon.

Sekvas la klarigo de la financa situacio fine de 1952: la kasistino Fino Terryn antaŭmetas bilancon el kiu montriĝas ke la jaro 52 montras deficiton de 1.400 F. Pro tio ni por '53 plialtigis la kotizojn.

La sekretario petis ĉu iu preparis rimarkigojn rilate la raporton aperintan en la maja numero de F.E. Ĉar neniu sin anoncis, la sekretario alvokas al varbado de enloĝantaj membroj; li komunikas statistikon el kiu resultas la jenajn ciferojn por la sekcioj (nur rilate la enloĝantojn!):

Antverpeno: 8 — Blankenberge: 4 — Brugge: 10 — Brussel: 1 — Gent: 2 — Mechelen: 9 — Leuven: 0 — Kortrijk: 4 — Se do el Blankenberge membriĝas 4 enloĝantaj membroj, tiam certe la cifero por Brussel, Gent kaj Leuven ne estas sufiĉe alta.

Laŭ la vortoj de la sekretario la ĝenerala atmosfero en la Ligo ne konvenas por idealista movado, kaj el organiza vidpunkto, la kunlaboro inter la estraro kaj la sekcioj kaj reprezentantoj preskaŭ ne plu ekzistas. Post la publikigo de la raporto, nur Sro Meeus (Antverpeno) skribis leteron al la sekretario klarigante sian starpunkton.

Sro Van de Velde, la sekretario de sekcio Gent, respondas ke du iniciatoj de sekcio Gent malsukcesis pro la ne - respondo de la Liga sekretario. Sro Maertens respondas ke en la unua afero li kulpas pro la nerespondo, sed ne pro malsukceso, ĉar la respondo nur povis esti negativa. Pri la dua aranĝo (vizito de sekcio Gent al Brugge) — ekster la sekretaria kompetento, ĉar temas pri sekciaj interrilatoj — la sekretario respondas ke li ne plu rememoris.

La Prezidanto donas la parolvicon al nia UEA-delegito, Dro Couwenberg, kiu skizas la hodiaŭan situacion de la UEA varbado ĉe Fl.L.E. Li klarigas ke la delegitreto pliampleksiĝis, kaj, kvankam la membronombro (individuaj membroj) ne kreskis, ĝi do progresas relative, ĉar la membraro de Fl.L.E. dum 52 malkreskis.

Tre rapide Sro Debrouwere fermas la kunvenon por esti ĝustatempe en la urbodomo de Antverpeno, pro la akcepto de la kongresanaro fare de la urbestraro.

### Solena kunsido de R.B.L.E.

S-ro M. Jaumotte, vicprezidanto de R.B.L.E., malfermas la solenan kunsidon je la 10a. Li estas ĉirkaŭata de S-ino Plyson, kasistino, de S-ro J. Sielens, ĝenerala sekretario, kaj de S-ro J. Soyeur, sekretario.

Post enkonduka parolo, li transdonas la parolvicon al S-ro Soyeur, por la legado de detala raporto pri la laboro de R.B.L.E., dum la pasinta jaro 1952a.

Tiu tre kontentiga kaj tre lerte verkita raporto estas longe aplaŭdata.

S-ro Jaumotte, nome de la „Fondajo Jennen", kiun li prezidas, poste transdonas la premion por 1952a al la „Brusela Grupo Esperantista", kiu akiris la plej altan kvocienton en la konkurso inter la Grupoj. Li klarigas kiel tiu lukto inter la grupoj restis vigla ĝis la lastaj tagoj de la jaro, kaj tutspeciale kaj kore gratulas S-inon J. Plyson, kasistinon, al kiu li transdonas belan diplomon, kune kun la gajnita mona premio. Longa aplaŭdo sekvas.

S-ino Plyson dankas; kaj petas tiam la prezidanton transdoni al S-ino Ernst, kiu baldaŭ vojaĝos Vienon, flageton trikoloran kun la nomo „Belgujo" kaj kiu estas ornamonta, kun la aliaj naciaj flagoj, la Internacian Muzeon de Wien. S-ino Ernst promesas tuj havigi tiun flageton al S-ro Steiner, sia iama profesoro.

S-ro Jaumotte ankoraŭ aplaŭdigas la nomojn de s-inoj F. kaj E. Staes, kiuj jus ricevis la insignon de veterananinoj; post kio li aprobigas, per unuanima voĉdono, la proponon organizi, komune kun Flandra Ligo Esperantista kaj kun LEEN, kongreson en Lieĝo, en 1954a, ĉar pro la Universala Kongreso en Haarlem, - tiu ĉi lasta Ligo tamen ne deziras organizi, en propra lando, kongreson je Pentekosto. S-ro Soyeur akceptas ĝin organizi, eventuale en akordiĝo aŭ kun helpo de apude loĝantaj samideanoj.

S-ro Jaumotte fine faras alvokon por la Honora Kolono de 1954 kaj tuj enskribiĝas kaj pagas la kotizon 63 ĉeestantaj kongresanoj. Ankaŭ la alvoko direktita favore de la Liga Kaso ricevas bonan akcepton.

Fine estas legataj diversaj leteroj kaj telegramoj envenintaj de en- kaj eksterlando, nome de s-ino Elworthy-Posenaer, la pionirino kiu neniam forgesas sendi sian bondeziron; de s-ro Vandevelde, kiu de 1920, por la unua fojo, ne povas ĉeesti la jaran kongreson pro malbonfarto; de G-roj Hérion el Verviers, de s-ro Charles Elliott (Britujo) kaj de organizajoj, kaj personoj, kies leteroj estos legataj dum la komuna ferma kunsido.

Intertempe D-ro Kempeneers, kiu vizitis la kunvenojn de LEEN kaj de Flandra Ligo, estas enirinta la salonon kun D-ro Lapenna kaj ambaŭ ankoraŭ aldonas kuraĝigajn kaj entuziasmigajn vortojn.

Fine S-ro Ch. Van Gompel rediras, laŭtradicie, sian paroladon de la antaŭa tago, en la kadro de la Oratora Konkurso. La prezidanto gratulas lin kiel laŭreaton, kiu bone meritis la premion, kiu estos havigata al li.

Kaj, en la plej bona atmosfero, finiĝas tiu solena kunsido, ĝustatempe por ke ĉiu povu, promenade, iri al la Urbdomo.

### EN LA URBDOMO

## Oficiala akcepto fare de la Urbestraro

Kelkajn minutojn jam antaŭ tagmezo, la Kongresanoj tute plenigis la grandan Leys-salonon de la Urbdomo, kie kutime okazas la oficialaj akceptoj.

Baldaŭ aperas malantaŭ la verda tablo, la urbestro S-ro Lode Craeybeck, eksministro kaj deputito, kaj kiu estas sekvata de multaj urbaj konsilantoj.

S-ro Jaumotte ilin ĉiujn salutas kaj faras kelkajn prezentadojn.



*La Kongresanoj aŭskultas la Urbestron.*
(kliŝo: „Le Matin")

Tiam li alparolas la urbestraron kaj speciale la urbestron :

Jam diversfoje la esperantistoj, kiuj estas kongresemaj homoj, estis akceptataj en tiu ĉi salono : dufoje okaze de Universalaj Kongresoj en 1911 kaj en 1928 ; diversfoje por aliaj kongresoj kaj jubileoj.

Ĉiuj la Kongresanoj estas tamen speciale fieraj pro la fakto ke la urbestro mem ilin bonvolas akcepti kaj la parolanto sentas sin ankaŭ tre feliĉa esti akceptata de iama lerneja kamarado, kiu intertempe tamen iĝis la unua civitano de grandurbo.

La urbestro tuj respondas laŭ la sama maniero kaj gratulas la prezidanton pro lia lerteco.

En sia improvizita parolado, la urbestro tiam tuj klare montras ke li estas vere, tute favora al mondlingvo, por kiu li cetere verkis, kiam li estis jurnalisto, artikolojn en taga jurnalo. Li memorigas ke la urbestraro decidis doni la nomon de D-ro Zamenhof al nova strato kaj promesas, ke la urba administracio ĉiam apogos ĉian proponon, kies sekvo estus la pli bona komprenigo inter la homoj.

S-ro Jaumotte petas la permeson rapide resumi por tiuj, kiuj ne komprenas la nederlandan lingvon, la jus eldiritan paroladon. Kaj klare aŭdebla kaj belsona, nia lingvo traflugas la salonon. Kaj la urbestro, kiu amuze kaj interesite aŭskultas, speciale gratulas la tradukinton kaj samtempe atestas pri diversaj kvalitoj, kiujn li ekaŭdis kaj kiujn li retrovas parte en diversaj naciaj lingvoj sed kiuj laŭsajne kunestas ĉiuj en Esperanto.

D-ro Van Gindertaelen, kiu ankaŭ ekkonis la urbestron, - nome en la Juĝejo, kiel talentplenan advokaton, - dankas la urbestron kaj la urbestraron pro ilia helpo pasinta, nuna kaj ankaŭ promesita. Li akcentas la fierecon de la Kongresanoj pro tiu ĉi akcepto kaj ankaŭ pro la decido de la urbestraro doni la nomon de la kreinto de Esperanto al nova strato, en tre densa kvartalo de la urbo.

Tiam komenciĝas rondirado tra la plej gravaj salonoj de la Urbdomo : la granda kaj la malgranda Leys-salonoj, la Edziĝa Salono, la Festsalono, nomata „salono Reĝino Astrid", en kiu kuŝas robo de ŝi, la Milico-salono, la Konsilantarejo kaj la impona ŝtuparejo. Ĉie S-ro Jaumotte laŭtvoĉe kaj en Esperanto klarigas la belajojn kaj vidindajojn.

Antaŭ la Urbdomo, atendas kelkaj jurnalaj fotografistoj kaj la kongresanoj do dummomente grupiĝas, por tuj poste iri al la Flandra Operdomo, kie, sur la ŝtuparo, okazos la oficiala kongresa forografado.

## La Kongresa Festeno

Je la 1,30, la plej granda parto de la kongresanoj ree kuniĝas en la salonoj „Femina", sub la kinejo „Ambassades", kie longaj tabloj estas aranĝitaj por akcepti pli ol ducent festenontojn.

Bela menuo estas transdonata, ĉe l'komenco, al ĉiu enskribito kaj ĝi mencias :

*Antaŭmanĝajoj*

—

*Tomato Supo*

—

*Duona kokido kun pomkompoto kaj terpomoj*

—

*Glaciajo*

—

*Kafo*

En plej agrabla atmosfero, rapide pasas duo da horoj, kaj kiam la kafo estas alportata, estas jam tempo, por unuj iri al la laborkunsido de LEEN, kiu ankaŭ daŭrados dum la posttagmezo, por aliaj rapidi al la Plantinmuzeo.

## En la Plantin-Moretus-muzeo

Proksimume sepdekkvin kongresanoj eniras, iom post la kvara, tiun esceptan kaj tre specialan muzeon, kiu donas la okazon al la vizitantoj, admiri la belajojn de unu el la aŭtentikaj patriciaj domegoj de Antverpeno kaj samtempe interesiĝi pri la evoluo de la arto presado en la vera senco de la vorto.

Ankaŭ propagandcele, tiu vizito estas fruktodona, pro la fakto ke S-ro Jaumotte, kiu kondukas la vizitantojn de unu salono al alia, ĉie per laŭta voĉo ĉion klarigas en nia lingvo.

Iom post la kvina, finiĝas tiu vizito kaj la grupo direktiĝas tiam al la apuda Tunelo sub la Skeldo, speciale rezervata al la piedirantoj, vizitas la sudan promenadejon laŭlonge de la Skeldo-kajoj, trairas la Eŭropan Vagonaron, kiu dum kelkaj tagoj staras apud la Steen-kastelo, kaj, tiam, promenade, reiras al la Kongresejo.

## La Granda Vesperfesto

Viglaj preparadaj laboroj estas dume farataj en la salonegoj, kie okazos baldaŭ la granda teatra kaj horegrafia, skeĉa kaj kanta festo de tiu ĉi Kongreso, al kiu kunhelpos ceteré elementoj el la tri kunlaborantaj Ligoj.

La Festo komenciĝas per allogaj evoluoj de la Zeista Junulina Grupo, kiun gvidas G-roj van Wijnen-van der Sanden kaj S-ro P. Enkelaar kaj kiu konsistas el dektri fraŭlinoj: Joke Beun, Inge Jensen, Cobie Voerman, Janny Bos, Corry Drost, Marry van Hall, Finie van der Lee, Bep van der Lee, Riek Cammeraat, Lies Rietveld, Helga Markus, Fya van den Baan, Truus Erkelenz.

Tiu ĉi grupo prezentas unue flordancon, en kiu estas montrata la vivo de la floroj; teatrejeton de S-ro A. van Wijnen „Jes, mia karulino", en kiu S-ino Van Wijnen ludas la rolon de avinjo, ĉirkaŭata per multnombra nepinaro, - la preskaŭ kompleta grupo de junulinoj -, kaj en kiu ankaŭ aperas S-ro Enkelaar. Fine, tiu unua parto de la programo kompletiĝas per eleganta „Menueto".

Grandan aplaŭdon tiu Grupo akiras post ĉiu numero kaj ankaŭ, je la fino, kiam la LKK-prezidanto ĝin speciale gratulas.

Poste, la Brusela Grupo de R.B.L.E. prezentas la konatan teatrajeton de la franca aŭtoro Tristan Bernard „Angla Lingvo sen Profesoro", en kiu s-ro Jozef Weyn, kiel la interpretisto ; s-ro M. Jirousek, kaj F-ino Gisèle Oleffe, kiel juna paro ; S-ino Marg. Weyn, kiel hotelestrino ; S-ro Jean Oleffe, kiel polic-inspektoro ; S-ro Phil. Van Geit, kiel servisto, kaj S-ro Franc. Van Hooyiandt, kiel Hogson, meritas la belan, akiritan sukceson kaj en kiu estas ankaŭ ne-nomita policano, speciale veninta el Bruĝo : S-ro Marcel Poupeye.

La tria parto konsistas el tuta serio de amuzaj skeĉoj, kies ludadon prenas sur sin la sekcio Bruĝo de Flandra Ligo Esperantista. En la programo estas menciitaj kiel ludantoj de tiuj ĉi skeĉoj : G-roj Roose-De Kersgieter, F-ino Marie-Thérèse Roose kaj Huguette Hofman, en diversaj numeroj, kaj S-roj Roger kaj Grégoire Maertens, André Dumarey kaj Roger Iserentant.

Temas pri „La Honortribunalo" de Raymond Schwarz ; „La Tempo de la granda Purigado" ; „La Ŝvebanta Homo" ; „La unua Kverelo", „Jen la Amo" kaj „ĝis la Revid' ", konkluda kanto por tiu ĉi bela festo.

Kiel la aliaj kunlaborantoj, ĉiuj membroj de tiu ĉi grupo ankaŭ estas longe kaj varme aplaŭdataj post ĉiu skeĉo.

Inter diversaj numeroj de tiu ĉi ampleksa programo, estas okazo por ĝui la agrablan, varman voĉon de S-ino Jelly Koopmans-Schotanus, soprano, kiu, akompanata ĉe la fortepiano de F-ino Idoen Rotteveel, kantas tutan serion de belektitaj kantoj sur muziko de F. Gazelle, de Carl Bohm, de Franz Schubert, de E. Grieg kaj Joh. Brahms.

La tradukojn de la tekstoj prizorgis, por unu, S-ro H. Vermuyten ; por la aliaj la kantistino mem.

Se ni citas ŝin laste, ŝia sukceso tamen ne estas malpli granda ol tiu de la grupe ludantaj kunlaborantoj. Ankaŭ ŝi kaj ŝia akompanantino vere meritas ĉies laŭdojn.

Menciu ni tie ĉi ke, dum tiu ĉi festo, estas ankaŭ aŭdigata oficiale la „Beneluksa Kongreskanto", komponita de la antverpena samideano S-ro G. Debacker, laŭ teksto de S-ro H. Vermuyten.

Ertas S-roj C. Ameryckx kaj P. Peelman, kiuj prezentas la kanton, akompanataj ĉe la fortepiano de F-ino Clara Peeters.

Nome de la du aŭtoroj specialaj ekzempleroj estas donacataj al diversaj eminentuloj, meze de la ĝenerala aplaŭdo.

# LA LUNDA TAGO

## Ŝipekskurso sur la Skeldo per speciala „Flandria"-boato

Iom post la oka kaj duono jam, alvenas la unuaj kongresanoj ĉe la Steenpontono, kie atendas la speciala „FLANDRIA"-boato, kiu kondukos la tutan grupon ĝis la nederlanda landlimo.

Je la naŭa, ankoraŭ mankas kelkaj partoprenontoj, inter kiuj la Kongresa Prezidanto, pri kiu oni poste ekaŭdos, ke li malsaniĝis.

Je kvarono post la naŭa do, la ŝipo forlasas la kajojn kaj komenciĝas, - en la plej bela vetero kiun oni povas imagi al si por tia ekskurso -, longa veturado meze de tiu Skeldo-riverego, kiu neniam ripozas : Ĉiam la akvo moviĝas en larĝaj, fortaj ondoj kaj ankaŭ ĉiam alvenas kaj foriras grandaj kaj pli malgrandaj ŝipoj, kiuj iras ĉu al la Rejno aŭ unu el la aliaj riveregoj de Nederlando ; ĉu al Vlissingen, de kie ili entreprenos la transmaran vojaĝon.

Dank' al abundaj klarigoj de S-ro Jaumotte, same pri la vivo sur la Skeldo, kiel pri ĉio, kio kuŝas laŭlonge kaj je ambaŭ flankoj de ĝi, tiu ĉi ekskurso iĝas ne nur agrabla, sed ankaŭ interesa kaj instrua.

Je la dekunua, oni haltas dum duonhoro en Lillo, la stranĝa vilaĝeto, enkarcerigita en ĝia malnova fortikajo, kaj je la 11,30 oni reenŝipiĝas por la revojaĝo al Antverpeno.

Dum la dua parto de la ŝipirado, kantaretto kvarfolia, pretigita S-ro J. Vinck, estas metata je la dispono de la kongresanoj kaj baldaŭ ekaŭdiĝas konataj kantoj, kiujn ĉe la mikrofono antaŭkantas S-ro K. Ameryckx, helpata de kelkaj el la Zeistaj junulinoj, kiuj baldaŭ devas refreŝigi sian gorĝon per alloga glaciajo !

Je la 12,30a akurate la ŝipo al-kajiĝas.

Ĉiuj diras sian kontentecon pri tiu bela ekskurso kaj ankoraŭ lastfoje admiras la belan flagon de Flandra Ligo Esperantista, kiu flirtas ĉe la ĉefmasto, kaj kiu malrapide nun estas malsuprenigata.

### REZOLUCIO PRI UNESKO

prezentita de la Kongresestraro kaj akceptita unuanime de la ĉeestantoj de la Beneluksa Esperanto-Kongreso, okazinta dum la Pentekostaj Tagoj, 23an, 24 an kaj 25an de majo 1953a en **Antverpeno (Belgujo).**

—

**La BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO en Antverpeno, kiun partoprenas 350 reprezentatoj de Esperanto-Asocioj kaj Grupoj el la tri koncernaj landoj kun kontento konstatas, ke UNESKO prenis en konsideron la internacian petskribon favore al la Internacia Lingvo Esperanto kaj nun studas la sekvojn donotajn al ĝi.**

**La reprezentantoj de la Esperanto-Movado en la Beneluksaj landoj esprimas sian esperon, ke la Ministerio pri Edukado kaj la aliaj kompetentaj instancoj de Belgujo, Nederlando kaj Luksemburgo donos sian plenan apogon al la petskribo, des pli ke ĝin subskribis gravaj organizajoj kun pli ol 1.000.000 da membroj kaj pli ol 100.000 individuaj personoj el Benelukso.**

**La Kongreso komisias la respektivajn komitatojn de la Esperanto-Asocioj prezenti tiun ĉi rezolucion al la Ministroj pri Edukado de Belgujo, Nederlando kaj Luksemburgo.**

**En Antverpeno, la 25an de majo 1953a**



*La Kongresprezidanto dankas la Urbestraron*
(kliŝo: „Gazet van Antwerpen")

### Komuna lunda manĝo

Promenade aŭ trame, ĉiuj nun iras al la centro kaj multaj al la kongresejo kie, je la 13a, granda grupo ree kunsidas ĉe restoraciaj tabloj por la komuna lunda manĝo, pli simpla ol la dimanĉa, sed kiu tamen estas bonvena post la apetitiga ekskurso.

Ĝi finiĝas ĝustatempe, tiel ke la granda plimulto de la Kongresanoj povas, ne rapidante, iri al la Rubensdomego, kie okazos la lasta vizito de tiu ĉi Kongreso.

## En la Rubensdomego

Estas antaŭ duoble granda grupo de pli ol cent kvindek kongresanoj, ke okazas tiu ĉi dua muze-vizito kaj ke S-ro Jaumotte komencas, en la belega korto de la Rubensdomego, siajn klarigojn pri la granda pentristo P. P. Rubens, pri liaj du edzinoj pri lia arto kaj pri lia domo, kiu ne estas fakte muzeo pri Rubensverkoj, sed la loĝejo de la artisto, en kiu li pasigis gravan parton de sia vivo ; en kiu mortis lia unua edzino : en kiu naskiĝis infanoj liaj kaj en kiu, fine, li mem ankaŭ mortis.

Denove laŭtvoĉe kaj en nia lingvo, la gvidanto klarigas ĉiujn belajojn kaj atentigas pri ĉiuj vidindajoj.

Kaj ĉe la fino de la vizito li estas, - kiel la antaŭan tagon en la Plantin-muzeo, - rekompencata per granda, freŝa glaso da biero.

—

# Flandra Ligo Esperantista.

**Postbus 100, Mechelen**
**Prezidanto :** *Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.*
**Sekretario :** *Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la oficihoroj).*
**Kasistino :** *F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.*
**Biblioteko :** *E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)*
**U.E.A. peranto :** *Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.*
**Redakcio F.E. :** *Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)*
**Koresponda kurso :** *A. Nysstraat 37. Anderlecht*

## NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA"

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuyllplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp
Ĉefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

## La Solena Ferma Kunsido

Kaj estas jam tempo por reiri al la Kongresejo, kie ĉio prepariĝis por la Solena Ferma Kunsido.

Estas meze de la ĝenerala konsterniĝo, ke S-ro Jaumotte, ĉe sia supreniro de la podio, kie li estas ĉirkaŭata de proksimume la samaj eminentuloj de nia movado, kiel sabaton, devas ja nun anonci ke la Kongresprezidanto, D-ro Theo Van Gindertaelen, forestas pro malsano.

Li proponas la alsendon de telegramo de simpatio : D-ro Van Gindertaelen efektive ne nur estas la Kongresprezidanto. Li ankaŭ estas membro de la L.K.K. kaj, kvankam li loĝas en Mehleno, li tamen ĉeestis ĉiujn kunsidojn kaj prenis tre viglan parton en la preparaj laboroj sur sin, i.a. koncerne la Kongreslibron kaj la memorigan poŝtkarton.

La funkcianta prezidanto tiam proponas sekve al la parolado de D-ro I. Lapenna pri „Esperanto kaj Unesko" kaj nome de la estraro, la akcepton de la rezolucio (p. 3), unuanime akceptata.

S-ro Jaumotte ankoraŭ donas la okazon por saluti la kongreson al D-ro Wegener, kiu estis malhelpata tion fari sabaton vespere ; kaj tiam legas mem la ricevitajn leterojn kaj telegramojn.

Li poste transdonas la parolvicon al S-ro A. Weeke, vicprezidanto de LEEN. Tiu ĉi gratulegas la Lokan Kongresan Komitaton kaj ĝian vivoplenan prezidanton, kiu efektive, dum la tuta Kongreso, ne nur estis la estro de la granda aro da kunlaborantoj, sed kiu vere prenis sur sin gigantan, kvaroblan taskon ; kaj kiu zorgis ke ĉio plej akurate disvolviĝis.

Entuziasma aplaŭdo sekvas tiujn parolojn, por kiuj S-ro Jaumotte dankas, leviĝante.

S-ro G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista, aldonas siajn gratulojn al tiuj jam direktitaj kaj ankaŭ S-ro H. Sielens, nome de Reĝa Belga Ligo Esperantista diras sian ĝojon pri la kompleta sukceso de tiu ĉi unua klopodo de lojala, amika kunlaborado inter la tri Ligoj.

Tiam S-ro Jaumotte leviĝas por la ferma parolado :

Li dankas por la al li kaj al liaj kunlaborantoj en kaj ekster la L.K.K. direktitaj vortoj ; diras sian grandan ĝojon pro tiu kunesto, en kiu, - de la unua ĝis la lasta momento -, regis vera amikeca atmosfero kaj kiu pruvas ke iamaj disputetoj, kiuj cetere okazas en la plej bonaj familoj, havas nenian gravecon...nun precipe, kiam ĉiuj pli bone interkonatiĝis ; nun kiam ĉiuj sin, pli firme ol iam, sentas membroj de unu granda familio. Kaj li alvokas al daŭra komuna laboro kaj al baldaŭa revido, ĉiuokaze en la proksimaj kongresoj.

Ŝajnis ke ne venos fino al la ovacio ĉe tiuj ĉi tiuj ĉi vortoj...Kaj estas „La Espero", kunkantata de ĉiuj, kiu estas la konkludo de tiu ĉi memorinda kunveno kaj de tiu ĉi bele sukcesinta Kongreso.

## Telegramoj kaj leteroj

Telegrame kaj poŝte envenis salutoj al la Kongreso de Ligoj, Grupoj kaj individuaj samideanoj. Jen la listo :

Centra Dana Esperantista Ligo ;
Germana Esperanto-Asocio ;
Hispana Esperanto-Federacio ;
Sveda Esperanto-Federacio ;
Naturamika Movado en Flandrujo, kiu samtempe kongresis en Antverpeno ;
Belga S.E.L.-Agento (Skoltestro C. Van Aken)
Nederl. S.E.L.-Agento (Skoltestro F. Elias)
S-ino M. Elworthy, belga pionirino ;
S-ro Cl. Vandevelde, Gento ;
G-roj Hérion, de la Verviersa Grupo ;
S-ro Deruyver, Huy ;
S-ro Charles Elliott, brita samideano, kiu jam ĉeestis kongreson en Belgujo ;
F-ino Helena Hrodkova Zvolen, Ĉehoslov.
S-ro R. Molera, nome de la Esperanto-Grupo de Moya (Barna-Hispanujo) ;
S-ro C. A. Hickey, Mosman (Aŭstralio)
S-ro Johannes Thomä, Flonheim (Germ.)
S-ro K. H. Gerth, Hameln (Germ.)
ktp., ktp.

## LOKAJ NOVAJOJ

*Arnhem :* En kunveno arangita de la Arnhema Kunlaborkomitato parolis F-ino M. Vermaas el Rotterdam pri Islando, lando de frosto kaj fajro. En interesa maniero la prelegantino rakontis pri lando kaj popolo de ĉi tiu insulo. Belaj lumbildoj ilustris la parolitan vorton.

La 30-an de Aprilo oni aranĝis en iu kvartalo de Arnhemo balonkonkurson. Sur la aldonita bileto estis ankaŭ esperantlingve petate pri nomo kaj adreso de la trovinto.

*Brugge :* Nia sekcio pliriĉiĝis per denaska Esperantistino, ĉar en la familio de nia simpatia membro Maurice Demol, naskiĝis kvina filineto, kiu akiris la nomon de Katrien. Korajn gratulojn !

*Mechelen*: La programo por junio-julio aspektas jena : 17/6, Enigmoj ; 24/6, Gramatiko ; 1/7, Variaĵoj ; 8/7, Prelego ; 15/7, Enigmoj.

# Reĝa Belga Ligo Esperantista

*Prezidanto :* D-ro Paul Kempeneers, 106, Rue Général Lotz, Uccle-Bruselo
*Vicprezidanto :* S-ro Maur. Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk
*Ĝenerala Sekretario* : S-ro Henri Sielens, Houwerstraat 12, Antverpeno.
*Sekretario :* S-ro Joseph Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing
*Kasistino* : S-ino Julia Plyson, 185 rue Jourdan, St. Gilles-Bruselo
*Redakcio de B.E. :* De Bruynlaan 44, Wilrijk (Tel. 37.77.58)

## BELGA KRONIKO

ANTVERPENO

**Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"**

*(Poŝtĉekkonto : 726.54)*

**Programo de la venontaj kunsidoj :**

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw", Frankrijklei 4, je la 20, 30a :

*Junio* : diplom-disdono : la 19an ; la 26an ; diskutvespero.

*Julio* : la 3an : Parolata Jurnalo ; la 10an : Praktika ekskurso tra la urbo ; la 17an : Amuza Vespero ; la 24an : Parolado de S-ro Ameryckx pri „Centra Hejtado" ; la 31an : Parolado de s-ro Verstraeten.

*Aŭgusto* : la 7an : Parolata Jurnalo ; la 14an : Agrabla senprograma kunesto ; la 21an kaj la 28an : Raportoj prilibertempaj.

*Septembro* la 3an : Parolata Jurnalo.

### POSTKONGRESETO

### Kabareda vespero de la junularo de „La Verda Stelo"

Post la kantado de „La Espero", preskaŭ je la 5a, ankoraŭ multaj aŭskultas la gajajn gejunulojn de loka grupo „La Verda Stelo", kaj kiuj prezentas veran kabaredan vesperon.

Unue, la ĉeestantoj estas enkondukataj pere de imaga radio-aŭdilo, en diversajn gravajn radio-staciojn kaj povas aŭskulti bonegajn imitaĵojn diverslingvajn. Baldaŭ oni alvenas en la Esperantan radio-stacion, kie oni ĉeestos kantojn, skeĉojn kaj teatraĵetojn en nia lingvo.

Jam en la unua numero, oni havas la okazon aŭdi la tutan grupon da kantistoj : F-inoj J. kaj M. Ameryckx kaj Lea Vinck kaj S-roj W. Vingerhoets, J. Vinck, W. Van Nereaux kaj Ch. Van Gompel, kiuj estas vigle aplaŭdataj.

En la teatraĵeto „La Kolbasoj", ni vidas la du fratinojn Ameryckx, F-inon Vinck kaj S-ron Ch. Van Gompel ; dum en „Sukceso Garantiata" aperas la fratinoj H. kaj P. de Ketelaere kaj ĉiuj ĝuas merititan sukceson.

Ankoraŭ en apartaj numeroj aŭdigas sin S-ro Vingerhoets kaj S-ro Van Nereaux, dum S-roj Vinck kaj Vingerhoets finsukcesigas la vesperon per neforgesebla duo...

La tuta ĉeestantaro bonege amuziĝas kaj montras per longa aplaŭdo sian plenan kontentecon pri tiu unu-hora prezentado.

Kaj tiuj, kiuj disponas pri plia horo aŭ pri pliaj horoj, ankoraŭ kune restas kaj dediĉas siajn lastajn fortojn al vigla dancado, tiel ke la Postkongreseto, same kiel la Kongreso, fermiĝis en plej kora kaj bonaj atmosfero.

Ankoraŭ longtempe la partoprenintoj memoros la Beneluksan Esperanto-Kongreson en

**Antverpeno, Skeldreĝino**

**Antverpeno la Senegala !**

Ŝvitintoj

* * *

Krom la ĉi supra Kongresa raporto en proze, S-ano Tyneverum, el Antverpeno, ankaŭ raportis en versoj (vidu kol. 4).

BRUĜO

**Bruĝa Grupo Esperantista**

*(Poŝtĉeknumero : 4835.33)*

**Programo de la venontaj kunsidoj :**

Ordinara kunveno : ĉiumarde je la 20a, en la sidejo „Gouden Hoorn - Cornet d'Or" Simon Stevinplaats :

*Julio* : 7an : Muzika vespero. — 14an : Parolata gazeto. — 21an : Nacia festo : Kunveno ne okazos. — 28an : Humoraĵoj.

*Aŭgusto* : 4an : Debato : Por aŭ kontraŭ ĉapeloj. — 11an : Parolata gazeto. — 18an : Konkurso pri la plej bona rakonteto (antaŭskribita). — 25an : Portretludado.

*Septembro* : 1an : Muzika vespero.

BRUSELO

**Esperantista Brusela Grupo**

*(poŝtĉeknumero : 1230.48)*

**Programoj de la estontaj konsidoj :**

Ĉiulunde, je 20h.30 en „Brasserie St Martin" Place du Grand Sablon, 38, Grote Zavel plein :

*Julio* : la 6an Parolata jurnalo ; la 13an : S-ro Van Geit : „Pri insektoj" ; sekvota de surprizoj ; la 20an, F-ino Obozinski : „Vojaĝo" ; la 27an, F-ino Kestens : Promenado tra malnova Bruselo.

*Aŭgusto* : la 3an, Parolata jurnalo ; la 10an, S-ino Elly Staes : „Amuza vespero" ; la 17an, S-ro D. Van der Stempel : „Kiel oni faras filmon" ; la 24an, S-ino M. Stern : „Novaĵoj" ; la 31an, S-ino Heyman : „Mia vojaĝo en la Nordaj Landoj".

*Septembro* : la 7an, Parolata jurnalo ; la 14an S-ino Daems : „Virina angulo" ; la 21an : S-ro Van Geit : „Munkeno" ; la 28an, S-ro L'Host : temo ne ankoraŭ komunikata.

### INTERGRUPA KONKURSO

Fondaĵo Antoinette Jennen

***Stato je la 31a de Majo 1953.***

| Grupoj | Poentoj 1952 | Poentoj 1953 | 0/0 |
|---|---|---|---|
| Antverpeno (Verda Stelo) | 565 | 496 | 88 |
| Bruĝo | 220 | 244 | 119 |
| Bruselo | 523 | 407 | 78 |
| Charleroi | 35 | 29 | 83 |
| Gento | 120 | 107 | 89 |
| Verviers | 36 | 63 | 175 |

**LA PROGRESANTO**

„La Progresanto", het maandelijks studieblad van F.L.E., is door zijn gevarieerde inhoud zeer geschikt voor groepsavonden en examenstudie.

Inhoud : Por komencantoj ; Por progresantoj, Facile legi Esperanton ; Kun krajono tra la literaturo ; Kiel ni diru tion ? ; diverse taalkundige artikelen, enz.

Abonné's kunnen hun taken ter correctie opzenden.

Prijs slechts fl. 2,— p. jaar. Bestellingen per giro op postrek. no. 34563 van de Ned. Esperantisten-Vereen. LEEN, Amsterdam.

## Komunikoj de la ĉefestraro

Het UNESCO-centrum in Nederland is voornemens in verschillende plaatsen contact op te nemen met onze afdelingen en afdelingen van andere organisaties, die op internationaal terrein werkzaam zijn. Daar zich hier wellicht een gelegenheid voordoet in bredere kringen bekendheid aan ons streven te geven verzoeken wij de afdelingsbesturen van een eventuele uitnodiging van het UNESCO-centrum goede nota te nemen en alle medewerking te verlenen.

**Opgelet !** Het adres van Mevr. H. E. te Straks-Leefers (adm. „De Esperantist") is weer : Lindelaan 14, Driebergen.

*Ter gelegenheid van het Esperanto-Benelux-congres is verschenen :*

**DEVENO KAJ VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO**

*van P. Stojan*

*Een interessant werkje, dat ieder gevorderd esperantist dient te bezitten. Prijs fl. 2,25. Bestellingen aan de boekendienst L.E.E.N. Afdelingen genieten bij bestelling van minstens 3 ex. een korting van 10 pct.*

### LA ŜVITA KONGRESO

(fantaziaj raporteroj)

*Ĉi-foje la kongreso*
*ne . . . pro la rim' „sukceso"*
*estis, nek pro l' ŝvito*
*sur strato kaj en lito*
*kaj . . . eble dum laboro !*
***Ne, - sole pro l' sufloro***
*de mildaj, amaj vortoj*
*en ĉies kor-retortoj,*
*kaj kiujn lertpilote*
*la gorĝo de Jaumotte*
*tra urbo, Skeld' gvidadis :*
*. . . paseon barikadis !*

* * *

*Kongreso de l' surprizoj*
*kaj de l' somerĉemizoj :*
*pro l' „bene luksa" vetero*
*kongreso de l' tolero !*
*Konsul' en Esperanta ;*
*anaro troe granda,*
*por ke la Ĉefurbano*
*regalu per ĉampano,*
*do zorgis li pri l' sato*
*per Zamenhofa strato,*
*pli bone preparita*
*eĉ ol festen' invita,*
*dum kiu ni sekciis*
*kokidon (ĥirurgiis ?)*
*en spec' de . . . pomkom-poto :*
*verkindas pri ĝi odo !*

* * *

*Kongres' de l' oratoroj*
*kun la kutimaj floroj :*
*ne paroladoj ĝenis*
*ĉar ĉiu ja . . . Lapennis,*
*(ne-kluko dum kongreso*
*kondamnas je forgeso)*
*Kongres' de l' prezidantoj,*
*(la krem' el niaj landoj)*
*lernemaj geamantoj,*
*(duoblaj Esperantoj)*
*Kongres' de skeĉludantoj*
*kaj belaj artaj kantoj,*
*de junaj junulinoj*
*en ĉarmaj danckombinoj.*
*Ve, estis unu dramo :*
*la Prezidant-malsano . . .*

* * *

*Se foton vi aĉetas*
*de l' ŝvita la kongreso,*
*mi urĝe al vi petas*
*atenti pri l' neceso*
*konservi ĝin tutfrida :*
*ĝi iĝus ja fluida . . .*

Tyneverum.

## La Listo de la Kongresanoj

Ĝi aperis en la Kongreslibro ĝis la numero 312. Aparta folio, samformata kiel la Kongreslibro, estos sendata al ĉiuj kongresanoj, tiel ke ili disponos pri la kompleta listo ĝis numero 356.